

Bona Espero



Cirkulero 74

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

Oktobro 2012

prezidanto: Bernd Schönberner ★ Westermannweg 17 B ★ D-30419 Hannover

☎ +49-(0) 511 7 63 63 565 ★ ✉ schoenberner.bernd@t-online.de

Karaj amikoj kaj subtenantoj !

Bonvolu legi kion skribas Ursula Grattapaglia el Brazilo:

Ek de nia lasta Cirkulero n. 73 en januaro 2012, multaj travivaĵoj okazis en Bona Espero. Tre simpatia okazintaĵo estis la vizito de *80 brazilaj esperantistoj* dum oficiala ekskurso de la Nacia Brazila Kongreso de Esperanto en Taguatinga (Brasília). Multaj el tiuj samideanoj neniam vizitis Bonan Esperon kaj restis entuziasmaj pro la teatra prezentado de la infanoj kaj la natura beleco de la loko.

Unu el la bonaj novaĵoj estas, ke la dekstra genuo de Ursula, kiu devigis ŝin restadi en Brasília 4 monatojn, por suferi komplikan kirurgion de genua protezo kaj rekuperi sin de la operacio, feliĉe estas nun denove kiel nova, danke al germana protezo Aeskulap el titano, kiun sperta kirurgiisto enmetis en la ĝustan ĉarniran lokon!

Sed ĝuste tiu nia deviga foresto el la bieno, ek de marto ĉi jare, kreis kelkajn problemojn, kiujn ni devis poste solvi en julio.

Unue evidentiĝis, ke, post nia foresto, prizorgi la infanojn en la domo, kaj en la lernejo, transporti kelkajn ĉiumatene al la urbo, planti la legomejon, zorgi la kuirejon ktp. estis tro multa ŝarĝo por Ada kaj Riccardo, precipe ĉar nia institucio akceptis ne atendite, kelkajn adoleskantojn kun seriozaj problemoj, kiel ekzemple Ana Carolina (17 jara) kun bebo dumonata, kiu bezonis apartan asiston. Pri tio ni plurfoje atentigis Ada, kiu pro troa laboro en la lernejo kaj en la domo, multe elĉerpiĝis dum la lastaj monatoj.



donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)
IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484
BIC : WELADEDIMES

kasistino:

Dagmar Rahn ✉ Hirschfeldstr. 3 ✉ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328
✉ dagmar@rahn76.de

Due, kiam la Estraro decidis kunvoki la jaran asembleon de Bona Espero en Brasília, pro la fakto ke Ursula ne povis vojaĝi, Riccardo montris ironian sintenon en la konfrontoj de la estraro, kaj krom tio deklaris ne respekti la decidon, jam pli frue prenitajn, defini partneran kontrakton kun la Ne-Registrara Organizo Unio Planeda en Brasília, kies fondinto estas nia ĝenerala direktoro Ulisses Riedel. Tiu sinteno estis subtenita de lia edzino Ada per skriba deklaro.

Tio evidente kreis internan krizon, kiun ni devis laŭgrade solvi.

Komence, dum eksterordinara asembleo, estis decidite plivastigi la socian kadron de Bona Espero per aldono de du eks-lernantinoj kaj aliaj tri membroj, aktive ligitaj al la objektivoj de nia Instituto kaj kiuj jam subtenas nin de jaroj. Tio por garantii kontinuecon en nia agado, konsiderante ke el la dek aktualaj membroj, almenaŭ sep jam atingis la sojlon de la 80-a/90-a vivojaro!

Kiam poste, en julio, Bona Espero decidis subskribi la kontrakton kun Unio Planeda, kiu garantios financajn kaj homajn rimedojn al la Instituto, Ada kaj Riccardo decidis forlasi Bonan Esperon kaj zorgi sian familian vivon.

Verdire ili klopodis forpreni kaŝe la infanojn el la respondeco de Bona Espero, sed la juĝisto de Alto Paraíso konsideris tiun ideon absurda, ĉar la infanoj estas sub la protekto de la registrita institucio kaj ne de du privataj homoj.

Kiel estas nun la situacio en Bona Espero:

LA ESTRARO :

La mandato de la nuna 5-membra estraro (Ulisses – Giuseppe - Ursula – Clarimundo – Ada) finiĝos decembre 2012. Pro la foriro de Ada, la asembleo anstataŭos ŝin dum novaj elektoj.

La partnera kunlaboro estas tre avantaĝa por Bona Espero, ĉar la Planeda Unio havas eblecojn akiri ĉe la oficialaj instancoj subtenon por nia agado, kiun Bona Espero ne sukcesis ĝis nun.

LA LERNEJO :

Ĉar Ada forlasis sian instruon, la urba administracio de Alto Paraíso ne havis la eblecon anstataŭi ŝin dum nur du semajnoj per alia oficiale dungita instruistino, kaj garantii la transporton de la infanoj al la lernejo en Alto Paraíso. Pro tio aŭtomate la filio de la urba lernejo, kiu funkciis en Bona Espero, provizore fermiĝis. Ni devis trovi urĝan solvon por garantii daŭrigon de la instruado por niaj infanoj, internaj en la Instituto. La solvo alvenis, danke al la helpo de la Unio Planeda, kiu provizis buson por la transporto kaj pagas la aliĝon de la infanoj al la nura privata lernejo en Alto Paraíso.



donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)
IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484
BIC : WELADEDIMES

kasistino:

Dagmar Rahn ☒ Hirschfeldstr. 3 ☒ D-59581 Warstein
 ☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328
 ✉ dagmar@rahn76.de

LA. MASTRUMADO DE LA INFANOJ KAJ DE LA BIENO:

Nia ekslernanto Valdemar kaj nia helpantino Maria Inacio daŭrigas sian aktivecon kiel antaŭe en la legomejo kaj en la domoj; la infanoj estas zorgitaj de geedza paro, Gladson kaj Suyane, kontraktitaj de la Unio Planeda; aliaj helpantoj deĵoras laŭvice en la kuirejo kaj komenciĝis programo, per helpo de junaj volontuloj kaj dumtempaj laboristoj, por renovigi la instalaĵojn, kiuj restis ne zorgitaj dum la lastaj monatoj.

Post la resaniĝo de Ursula, ni restados pli ofte en Bona Espero por superrigardi la tuton.



NOVAJ PLANOJ:

- Estas planita la starigo de "Asocio de Eks-lernantoj de Bona Espero" laŭ iniciato de niaj ekslernantinoj Edith kaj Amanda, kiuj estas kunordigantaj plurajn dekojn de eks-gelernantoj, kiuj interesiĝas pri la sorto de la hejmo en kiu ili estis edukitaj.

- Estas tre interese diskonigi, ke inter tiuj eks-lernantoj estas tri urbaj konsilistoj en urboj Alto Paraíso, Teresina kaj Goiânia. En la ĉefurbo de ŝtato Goiás, nia eks-lernanto de la jaroj sepdekaj, Santana Gomes, estas

urba konsilisto jam elektita por la dua mandato.

Kiam ni vizitis Goiânian en marto, okaze de esperantista evento, li akompanis nin dum vizito al la ŝtata sekretario pri Laboro kaj Civitaneco, kiu pozitive interesiĝis pri Bona Espero. Danke al tiu vizito, ni ricevas nun pli altan subvencion (30 centimoj de eŭro tage/infano, anstataŭ 15!).

- Esperantistaj volontuloj estos daŭre invititaj por garantii la esperantistan karakteron de Bona Espero, kaj ni planas la aranĝon de renkontiĝoj kaj seminarioj.

LASTA VIZITO:

Ni estis agrable surprizitaj per la alveno de granda ruldoma kamjono kun svisa familio de mond-vojaĝantoj; Jaques, Florence, kaj tri infanoj, Zacari, Zorah, Zelia, kiuj forlasis Eŭropon antaŭ du jaroj kaj per aventura vojaĝo tra Balkanoj, Rusio, Kazakistano, Mongolio, Ĉinio ĝis Malazio kie ili enŝipiĝis al Argentino, alvenis en Brazilo.

Ĉi tie ilia kamjono Mercedes paneis kaj ili devis restadi iom da tempo por ripari ĝin. Estis mirinde kiel niaj infanoj interrilatis kun la svisaj samaĝuloj ... en Esperanto dum preskau tuta monato.



donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)
IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484
BIC : WELADEDIMES

kasistino:

Dagmar Rahn ☐ Hirschfeldstr. 3 ☐ D-59581 Warstein
 ☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328
 ✉ dagmar@rahn76.de

Alia esperanto evento estis la partopreno de du estraranoj de Bona Espero, Ursula kaj Giuseppe, en la UN konferenco en Rio de Janeiro, kie ili prelegis formale en la angla pri esperanto kaj respondecaj dietoj, pri la influo de viando konsumo sur la naturo de nia planedo kaj la efiko sur la klimato.

NEKROLOGO

Okaze de la forpaso de *Margret Brandenburg* en la aĝo de 80 jaroj ni volonte aldonas kelkajn vortojn pri ŝia rilato al ni:

Antaŭ pli ol tridek jaroj Margret Brandenburg estis la motoro de la fondota Asocio por la Prospero de Bona Espero. Ŝi helpis nin aĉeti pere de katolika helporganizo Misereor la unuan traktoreton por la terkultivado, konstrui la grandegan tegmenton sur la infandomo kaj fine fondi en marto 1981 la registritan Asocion.

Margret estis dum jaroj la animo de la asocio. Bona Espero kun siaj respondeculoj kaj kun la centoj da protektitaj kaj edukitaj infanoj de la brazila internlando devas esti dankema porĉiame al Margret, al ŝia sentemo, ŝia forta volo laboregi por pli da socia justeco en la mondo!

Margret semis kaj semis konstante, ... eĉ kiam ŝi volontulis en Bona Espero!

Nome de la bonesperanoj

Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia

En la pasintaj 55 jaroj Bona Espero havis la eblecon, antaŭ ĉio per via subteno, helpi multnombrajn infanojn el ege malfacilaj familiaj cirkonstancoj.

Ni deziras Bonan Esperon ankaŭ por la venontaj jaroj multan sukceson! Koran dankon pro via helpemo kaj fideleco!

Bernd Schönberner

Bernd Schönberner



donakonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)
IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484
BIC : WELADED1MES

kasistino:

Dagmar Rahn ☐ Hirschfeldstr. 3 ☐ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328
✉ dagmar@rahn76.de